Nia amiko kaj najbaro



Hon. Fred R. Zimmerman

Kara Sinjoro Klukowski:

Jam de multaj jaroj, kiam mi ekinteresigis pri Esperanto en Usono kaj Eŭropo mi renkontis multajn kiuj estas tiel entuziazmaj pri la Lingvo Internacia kiel vi kaj mi.

En Hispanujo kaj Portugalujo mi renkontis homojn kiuj estis entuziazmaj kaj esperas ke iam Esperanto fariĝos la universala dua lingvo por ĉiuj popoloj de la mondo.

Kun bondeziroj mi estas

vere la via,

Fred R. Zimmerman
Statsekretario

A LETTER FROM OUR STATE SECRETARY

Mr. S. Klukowski
Editor, "Usona Revuo"
1018 Lincoln Avenue
Milwaukee, Wisconsin

Dear Mr. Klukowski:

It has been many years since my first interest in Esperanto and both in this country and in Europe, I have met many people who are as enthusiastic about the international language as you and I can be.

In Spain, and in Portugal, I met people who were enthusiasts and I am hopeful that some day Esperanto may become a universal second language for all of the people of the world.

With good wishes, I am

Yours very truly,
Fred R. Zimmerman
Secretary of State

Timo je Nova Milito Malaperas

Jen estas la opinio de D-ro J. Martin Klotsche, prezidanto de la Stata Instruista Kolegio de Milwaukee kiu ĵus revenis de vizito tra pluraj Eŭropaj landoj, laŭ raporto en la Milwaukee tagjurnaloj.

Li prezidis ĉe la Instituto de Mondaferejoj de Genevo, kie liaj personaj observoj estis subtenataj per la opinioj de 40 personoj el 17 landoj, kiuj ĉeestis la kunvenon.

D-ro Klotsche ne kredas ke Usono povos fini sian eksterlandan helpon je 1952, kiel nun proponata, sen serioza domaĝo al la celo de tiu programo.

Unuigita Germanujo estos necesa por paca rekonstruo de Eŭropo, sed, li diras, multaj Eŭropanoj, kiuj samopinias, ne scias kiel tio estos atingita. La ĉefa espero estas ke forta kaj pacienca sintenado le Usono finfine alportos plenan rekonstruon sen milito.

Rimarko de'l Redaktoro: Se la nova Kunveno de Eŭropaj Nacioj en Strassbourg adoptus Esperanton por siaj diskutoj kaj kontraktoj, granda paŝo antaŭen estus atingata por fonda de Unuigitaj Statoj de Eŭropo per la forigo de rivaleco de naciaj lingvoj.

ĈU VERE?

Certa fabriko de skribmaŝinoj uzas reklamiron por ĝia produkto, ke ĝi "rapidegas la mondkomercon."

Ni estas pretaj konsenti kun tiu kompanio, se nur ĝia skribmaŝino havas la internacian klavaron kaj estus uzata por komerckorespondo en la lingvo internacia.

Fear of New War Wanes

This is the opinion of Dr. J. Martin Klotsche, President of Milwaukee State Teachers College, who has just returned from a visit through many European countries, according to a report in the Milwaukee daily press.

He presided at the Institute of World Affairs in Geneva, where his personal observations were supplemented by the views of 40 persons from 17 countries, who attended the institute.

Dr. Klotsche does not believe that the U.S.A. can end its foreign aid program by 1952, as now planned, without serious damage to the goal of that program.

A united Germany will be necessary for a peaceful recovery of Europe, but, he says, many Europeans, who share that view, do not know how it will be accomplished. The principle hope is that a firm and patient attitude by the U.S.A. will ultimately bring complete reconstruction without war.

Editor's Note: If the new Assembly of European Nations in Strassbourg would adopt Esperanto as their language for debates and treaties a great step forward for a United States of Europe would be accomplished by the elimination of national language rivalries.

DOES IT — REALLY?

A typewriter company uses a slogan for its products saying that it "Speeds the world's business."

We are inclined to agree that it does, providing that the typewriter has the international keyboard, and is used for business correspondence in the international language.

EN CENTJARA DATROVENO DE MORTO DE F. CHOPIN

LA POLA MUZIKA GENIULO KIES
NOMO PRONONCAS FRIDERIK
SOPEN VIVIS EN LA JAROJ
1810-1849

La 16-an de oktobro nunjare pasos cent jaroj depost la morto de la plej fama, pola muzika geniulo, konata kaj ludata sur la tuta terglobo.

Friderik Chopin, malgraŭ sia france sonata nomo, estis Polo, naskita proksime al Varsava en Żelazowa Wola en la jaro 1810. Gaja, simpatia, sprita, humorplena knabo, "Fric" estis fiero kaj feliĉo de la tuta familio. Li montris tre frue grandan kajablecon en ĉiuj lernobjektoj k precipe eksterordinaran talenton en muziko.

Tre frue li komencis komponi k unuapase li obeis la postulojn eldiratajn de siaj instruistoj, Elsner k Witkiewicz, celantajn krei la nacian muzikon. La polonezoj k mazurkoj respegulas la inspiroplenan transformadon de popola muziko en geniajn perlojn de neaŭdita ĝis tiam belsoneco.

* * *

Depost la jaro 1829 komenciĝas jam la publikaj koncertoj de Chopin en Vieno k en la jaro 1830 li forlasis Polujon por ĉiam—en la antaŭtagoj de nacia insurekcio kontraŭ la rusa perforto k okupacio.

En Parizo li konatigis kun tiaj ĉef-famuloj kiel Liszt, Mendelssohn k multaj aliaj. La ludmanieron de Chopin adoris, admiris, k laŭdegis ĉiuj kritikistoj k muzikistoj.

La virinoj ĝis tiam ludis en lia vivo ne tro gravan rolon. Venis ja fine konata literaturistino George Sand (Aurore Dudevant), kiu emociĝe, sed ankaŭ detrueme influis la vivon de Chopin—k eble eĉ kaŭzis lian brustmalsanecon, kiu devigis lin translokiĝi por kelka tempo (kvar monatoj) en 1838 sur insulon Majorca.

Dum liaj sukcesplenaj jaroj, same kiel dum lia suferado pro malsaneco, sentis tamen Chopin ian sopiron je sia hejmlando, por kiu li serĉis esprimon en la muziko: en mazurkoj, baladoj, nokturnoj, etudoj. Kiam lia sano plibonigis, revenis Chopin Parizon, kie li donis sian lastan sukcesplenan koncerton tie.

Pro la februara revolucio le 1848, Chopin forlasis Parizon k forveturis Anglujon. Tie sekvis denove vico da koncertoj en Londono k en diversaj urboj de Skotlando. Sed la angla klimato ne estis favora por lia sano, kiu pli kaj pli malboniĝis. En januaro 1849 Chopin revenis Parizon, sed tiuj 9 monatoj estis nur velkiĝo de la altensvebema floro. La 16-an de oktobro 1849 lia animo forlasis la vanigantan korpon, la koro de granda revelacia novvoĵulo ĉesis bati . . . La ĉerkon oni enterigis en la tombejo Père Lachaise.

* * *

KION SIGNIFAS LA NOMO DE CHOPIN EN LA MUZIKO

En la historia disvolvigo de muziko enkondukis Chopin en la estrantan klasikan manieron vivigan spiroblon antaŭ ĉio per la uzo de novaj, neatendataj, refreŝigaj t.n. "modulaĵoj" k harmoniaj turnoj, de novaj kreipovaj k inspirigaj elementoj, per kiuj li multe antaŭenigis kompare kun sia epoko k pro tio influis nedubele la postvenintajn geniulojn de la XIX jarcento, ne esceptante la ger-

manan Wagner, la rusan Skrijabin k la ĉehan Smetana. Oni povas eĉ plien sekvi tiun influon ĝis la moderna t.n. "atona" muziko. La kristaloj de ĉieldolĉa harmonio de Chopin disŝutitaj tra ĉiuj liaj komponaĵoj mirigas, frapas nian atenton, subigas ĉies koron k elvokas neordinaran ĝuon kaj beatecon.

Sur la muzika firmamento ekbrilis Chopin kiel blindiga meteoro k per sia postbrilo li lumigas la vojon por ĉiuj, kiuj volas ekkoni la plej altrangan el la artoj k servigi sian talenton al vera k pura belo. Pro tio, kvankam Chopin devenas el pola nacio, malgraŭ lia france sonata nomo, li apartenas al la tuta mondo.

POSTMORTA REMEMORO

Granda perdo tuŝis polan esperantistaron pro la subita morto de unu el la tre valoraj kaj laboremaj propagandistoj de Esperanto. La 6.VIII.1949 mortis pro subita koratako nia karmemora Samideano.

Dro Romuald SOŁONIEWICZ,
kuvacisto en Zgierz.

La mortinto naskiĝis la 7.II.1893 en Pinsk/tiama resu gubernio/. Kiel gimnaziano kaj progresema junulo li esperantigis en la jaro 1910 kaj depost tiu tempo li senĉese laboris por Esperanto, ŭar ŭi tiu granda ideo de unu komuna lingvo ŭiam okupis lian senteman kaj noblan koron.

Dum medicinaj studoj li gvidis en Kaŭkazo esperantaj kursojn /1912-1917/ kaj tie li interkonatigis kun sia lernantino, venonta edzino—Maria Waleria KUNC, kiu estis lia vera kunulino dum lia tuta vivo, subtenante lin ŭiam en lia poresperanta laboro.

Dro Romuald SOŁONIEWICZ partoprenis en multaj esperantaj kongresoj, landaj kaj universalaĵ, kaj ĉiam kune kun sia edzino. Kiel kuracisto li kunlaboris en TEKA /Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio/ kaj en la jaro 1928 li subskribis alvokon al ĉiuj kuracistoj, farmacistoj kaj studentoj de ambaŭ fakultatoj, volontigante ilin al agiĝo.

En la jaro 1937—dum la jubilea kongreso en Varsovio—li ricevis kiel veterano de esperanta agado arĝentan steletinsignon por memoro. En postmilitaj tempoj li ankaŭ tre vige laboris sur la tereno de Łódź kaj estis delegito de U.E.A. en Zgierz. Li estis ankaŭ aktiva membro de UNIVERSALA LIGO /n-ro 5308/ kaj tre diligenta leganto de "La Praktiko."

En la jaro 1947 li estis prezidanto de Asocio de Esperantistoj en Pollando—Grupo Łódź. En sia urbo Zgierz li gvidis esperantaj kursojn en tieaj lernejoj kun bona rezulto. Ĝis la lasta vivmomento li estis vigla kaj fervora esperantisto, okupiĝante ĉiam pri niaj aferoj. Bedaŭrinde—la senkompata morto forrabis Lin neatendite el inter ni kaj profundigis la polan esperantistaron, kaj precipe Lian Familion, en dolorigan funebnon.

Dormu trankvile kara Samideano

Kaj Vi, estimataj Familianoj, kiuj promesis daŭrigi Lian poresperantan laboron, akceptu de la tuta esperantistaro profundsentan kondolencan.

M.S.

LEGU LA BIBLION, SED EN ESPERANTO

Jen, traŝagante hazarde mian Biblion, nature en Esperanto, mi vidas en Readmono 14-11:

"Ĉian birdon puran vi povas manĝi, sed ĉi tiuj el ili ne manĝu: la aglon, la pelikanon, k la perknopteron . . ." La aglon k la pelikanon mi konas, sed la perknoptero ne; kio estas ĝi?

Mi profitas mian poliglotismon por trarigardi alilingvaj tradukojn de la Biblio k en similaj paraĝrafoj, por perknoptero mi trovas:

anglegier eagle,
franceplongeon,
germaneStorch,
hispanecalamon,
italepica,
portugaleabutre,
k. t. p., k. t. p.

Tia rezultato pli kaj pli min konfuzas. Unue, ĉi tiu birdoj ne estas interkorespondaj unu kun alia; due neniu el ili estas perknoptero, aŭ neniu el ili sonas al ĝi. Kiu eraras? Mi trarigardis la plurvoluman, seriozan verkon de Lee Peters "Check List of Birds of the World" aŭ Kontrolita listo de birdoj de la mondo, en nia lingvo, k tie mi trovas efektive ke ekzistas birdo el la fakordo, akcipitrida familio, genro Neofrono k de Arabio k Egiptujo. Zamenhof estis speco kerknoptra, kiu trafugas la ĉielojn kaj neniu tradukinto konis tiun birdon ĉar ĝi vivas en aliaj landoj.

Sed, la Biblio devas esti tre akurate tradukata; la eraroj estas gravaj, k ĉi tie eraras la tradukojn angla, franca, germana, hispana, itala k portugala, k la tradukistoj, ne la Biblio, deklaras abomenajn por la tradukintoj. Atentu, atentu!

Leganto de la Biblio, lernu Esperanton!
El Esperantaj rimarkoj pri la Biblio.

Francisko Azorin.

NI PRESADAS
CION POR ĈIUJ

DE LA NEGOCKARTO
AL LIBRO

WE PRINT EVERYTHING
FOR EVERYBODY

FROM A BUSINESS CARD
TO A BOOK

In English or in Esperanto

ESPERANTO
PUBLISHING HOUSE

1018 W. LINCOLN AVE. PHONE MI. 5-8477
Milwaukee 15, Wis., U. S. A.

ĈU ISRAELO SOLVOS SIAN PROBLEMON?

En la "Saturday Evening Post" de la 20a de Aŭgusto, 1949, ni legas artikolon, sub la supra titolo, pri la sekvanta interesa rimarko.

"Israelo probas unuigi pli ol kvindek naciecojn en unu nacion. Ne depost la Turo de Babelo la Sankta Lando aŭdis tiom da lingvoj. En omnibuso de la haveno de Haifa al kampo de enmigrantoj nord-afrikano antaŭ nelonge parolis al kunvojaĝanto en franca lingvo pri la beleco de la kamparo. Lia kunvojaĝanto, elmigranto de Bulgarujo, demandis sian najbaron, ĉeho, por traduko. La ĉeho direktis la klarigon al proksima aŭstro, kiu tradukis la diron de la anua kunvojaĝanto en germanan lingvon. La multlingva omnibus-veturisto do klarigis la aferon en fluanta juda lingvo, dum la anua parolanto demandis france: "Kion li diris?"

"CAN ISRAEL SOLVE ITS PROBLEMS"

In the Saturday Evening Post of August 20, 1949, we read in an article under the above heading, the following interesting remarks. "Israel is trying to amalgamate more than fifty nationalities into one new nation. Not since the Tower of Babel has the Holy Land heard so many tongues. On a bus from Haifa Harbor to an immigrant camp, a North African recently addressed a companion in French on the beauties of the countryside. His companion, a refugee from Bulgaria, asked his neighbor, a Czech, to translate. The Czech referred the matter to a nearby Austrian, who turned the first passenger's comment into German. The polylingual bus driver thereupon explained the matter in fluent Yiddish while the original speaker demanded in French, "What did he say?"

ĴURO DE LOJALECO

(Pledge of Allegiance)

Mi juras lojalecon al la Standardo de Usono kaj al la Respubliko kiun ĝi simbologas. Unu nacio nedividebla kun libereco kaj justeco por ĉiuj.

Mi ankaŭ juras lojalecon al la Verda Standardo, la simbolo de monduoneco, de la rajto al mondciĵitaneco kaj de homarfrateco per interkompreno, kun libereco kaj justeco por ĉiuj.

EL OPERO "HALKA"

(Kanto el la plej fama polnacia opero)

Superflugi volus mi kun alaŭdeto,
Flirti en aero kiel hirundeto,
Naĝi kun fiŝeto en torento klara
Al vi, Janko kara!
Car mi nek fiŝeto sur Vistula fundo,
Nek mi alaŭdeto estas, nek hirundo,
Nur al mi kantetas vento la montara:
Venos Janko kara!
Se mi super fonto, kiel stel' radia,
Min speguli povus en animo via!
Kiel vaga lumo, kiu flamas pale,
Se al vi ekbrilus mia larm' kristale!
Car mi nek steleto en la font' brilanta,
Nek mi estas kampo lumo la vaganta,
Fluas do sur roso mia plend' sen fino:
Ve, al vi, knabino!

A TESTIMONIAL LETTER

THE NATIONAL BANK
OF EDGERTON

Edgerton, Wisconsin

October 28, 1949

Paul T. Schulze
Cashier

Mr. Stan A. Klukowski
Milwaukee 7, Wisconsin

Dear Stan:

In speaking with the members of our Rotary Club, your address was certainly mighty well received and appreciated by all. Many have indicated that an address of this kind exemplifies the principles of Rotary and it was very well delivered. I am sure that it will set all of us thinking along this line. It gave us a picture that we never had before and I think you are doing an outstanding work of pioneering.

We want to thank you very much for coming to us and I wish you lots of luck and success.

Sincerely,
(Signed) Paul T. Schulze

P. S. I will be glad to pass along your name to other clubs who may be looking for a speaker, as I believe they should all hear your message.

SUPERA STAL-PRODUKTA KORPORACIO

FABRIKOSTOJ DE

PATRICARO KAJ STALFABRIKAJOJ

(Manufacturers of Die Sets and Steel Fabrications)

SUPERIOR STEEL PRODUCTS CORP.

2754 South 19th St.

Milwaukee 7, Wis., U. S. A.

CASIMIR JANISZEWSKI

KAZIMIRO JANISEVSKI

President

Prezidanto

Esperanto Linguaphone Home Study Courses

You can learn the universally accepted and used world language, ESPERANTO, or any of the national languages listed below, by the world-renowned Linguaphone Ear-Eye Method. Order through the Interlanguage foundation

Esperanto	Russian	Greek	Persian
Italian	Malay	Swedish	German
Latin	Finnish	Hebrew	Dutch
Polish	Arabic	Bengali	Spanish
Chinese	French	Norwegian	Hindustani
Irish	Japanese	Czech	Afrikaans
English	Portuguese	Hausa	Efik

The complete Esperanto course, consisting of fifteen double-faced ten inch records, with the text printed in separate booklets, is \$50.

Members of our organization and teachers will receive special consideration. Write to the —

Interlanguage  Foundation, Inc.

1018 W. LINCOLN AVE.

MILWAUKEE 15, WIS.

SEND CARE PACKAGES TO NEEDY PEOPLE

IN WAR DEVASTATED COUNTRIES

People in America who are able and willing to share their good fortune with those who are less fortunate in other parts of the world, can do so in a most convenient way, by sending CARE food packages to needy people in war devastated countries of Europe, and to Israel, which also had its share of struggle and suffering. To those of our readers in America who do not have relatives overseas and would like to send a CARE package to some needy people in any country served by CARE, we would be happy to furnish names and addresses of such deserving people in any country they would like to help in this manner. You can send your gift packages through your local CARE office (in Milwaukee at 125 E. Wells Street. Harold Gauer, Director) or by sending your order directly to: Care, New York, N. Y.

LEGENDO PRI LA POTENCO

—Diru al mi, paĉjo, kial la suno ne falas malsupren?

La patro konfuziĝis, ĉar li mem ne sciis, kial la suno ne falas kaj punis la filon tial, ke li lin konfuzis.

La infano ektimis la koleron de la patro kaj neniam plu demandis la patron nek kial la suno ne falas, nek pri multaj aliaj objektoj, kiujn li tamen soifis scii. Tiu ĉi infano neniam fariĝis viro, malgraŭ tio, ke ĝi vivas en la mondo milojn da jaroj.

La infano restis malsaĝa kaj malsprita ĝis nun.

WARM RECEPTION

(Continued from page 1)

There were also cheers and applause when the Mayor spoke of his "warmth of affection" for the blind—about 50 attended the congress—and said that during 15 years he had been closely associated with a local society dealing with the welfare of the blind. (Esperanto textbooks and other literature, as well as a periodical are available for the blind in braille.—Ed.)

The Mayor expressed pleasure at finding that worship formed part of the program of the Congress.

"Without it," he concluded, "your efforts, which I know to be great, would be less effective."

Some of the world's leading educators and scientists, as well as representatives of governments, business, finance and industry, participated in this annual world gathering.

It was the 34th Universal Esperanto Congress since the introduction of the international language—the 10th of which was held in Washington, D. C., in 1910—and the 3rd since the end of World War II.

* * *

We shall strive hard during the next 2-3 years to bring this world Congress to the U.S.A., again, and to Milwaukee. Much will depend on the interest shown in this regard by the civic, business and education leaders of our city, state and country.

As Mr. Malmgren declared in Bourne-mouth: "Esperanto has not much money but it has another capital—idealism and faith in humanity."

RECENZOJ

ESPERANTOLOGIO

Kiel oni povas skribi recenzojn pri grandaj aferoj, pri valoregaj verkoj, tre alte sciencaj kaj bonege preparitaj, se tiuj samtempe troviĝas tiel teknikaj, ke oni sentas malfacilecon reteni la kapon sur la surfaco? Mi do ripetas: Kiel recenzi, nesciante la arton, kaj sentante la neeblecon por atingi la saman altan nivelon, nur povante suprenrigardi el la profundo.— Sed ĉiam serĉante, mi fine trovis elirvojn kaj povis ekvideti, de tempo al tempo, lumon surmonte, t.e., lumon de komprenebleco, kaj pri tio mi povas iom paroli.

Unue, **ESPERANTOLOGIO** sendube estas ne nur la plej grava, sed je la vidpunkto de la propagando, la plej impona pravigaĵo por la ekzisto de Esperanto ĝis nun aperinta. Neniam plu oni sentos, ke io estas ankoraŭ bezonata por pravigi Esperanton en la okuloj de la mondo. Trarigardu nur la imponajn nomojn de la Red. Kom. Tio, per si mem, metas nian Aferon por ĉiam samnivele kun la t.n. naturaj lingvoj! Tiu eldiro certe estas plene pravigita per la bonega enkonduko de D-ro Paul Neergaard, la Cefredaktoro. La lingvouzo, angle kaj esperante, estas senkompara.—Iom pri la enhavo: La unua artikolo de V. Setala: Lingva Esprimkapablo kiel funkcio de la Vorttrezoro, estas iom timiga por la pli multaj, sed eĉ pro tio, instigas al pli ol superflua legado. Estas mia konvinko ke, se oni diligente legos du aŭ eble trifoje, la rezulto certe estos kontentiga.

La plej alloga—laŭ propra vidpunkto, estas la artikolo de G. Waringhien: La Akuzativo en Esperanto.

Kvankam "el teoria kaj interlingvistika vidpunkto," la finrezultado sendube montras ĝeneralajn principojn, pri kiuj oni povas fari definitivajn konkludojn—ne plu apriorajn, sed nepre aposteriorajn, ĉar Waringhien prezentas al ni firman bazon, montrante la akuzativon en klara konturo, kune kun certajn avantaĝojn, kiuj estas percepteblaj en la "solideco de l'penso, kaj de delikateco en la stilo." Nur per la Akuzativo oni "celas esprimi, kaj ne nur babili."

La Artikolo de Reiersl kaj Marble prezentas tre interesajn komparaĵojn de la vortformado inter Esperanto kaj la Angla, en brila diskuto, sed ŝajnas finiĝi sen resuma konkludo.

Pri la lasta, ŝajnas, ke oni intence ĝin tiel metis pro sia grava pozicio en la studo de la diveno de Esperanto Vortoj—Ne nur tre instruiga, sed ja tenos la interesecon de la leganto ĝis la fino.

Nur la ricevo de **ESPERANTOLOGIO** havis grandan efikon. La unuaj pensoj, kiuj mense trafugis, avide rigardante la eksterajn, estis, ke

NUN NI MATURIGAS!

Elkopo.

PRI PREDIKOJ

Bona prediko estas celata al la koro kaj la menso . . .

ABOUT SERMONS

A good sermon is aimed at both the heart and the head . . .

ANONCETOJ

ESPERANTAJ POSTKARTOJ

Ni sendos al ĉiuj Esperantistoj ĉien, kvar belajn naturkolorajn bildpostkartojn de nia urbo k de kolegio Beloit, aŭ unu postkarto kun himno esperantista "La Espero" (muziknotoj k vortoj) kontraŭ unu respondkuponon. Ĉiuj kune kontraŭ du respondkuponoj aŭ egalvaloro en usonaj p. m., aŭ mono en Ameriko. Skribu al: Usona Revuo, 1018 W. Lincoln Ave., Milwaukee 15, Wis., U. S. A.

ESPERANTO PINS for ties and lapels; special pins for ladies. The tie pins are 25c—the others 40c. Include postage for mailing. We also have Esperanto flags priced from \$3.50 to \$10.00.

Interlanguage Foundation, Inc.

1018-20 W. Lincoln Ave.

Milwaukee 15, Wis.

ESPERANTAJ KRAVATOJ

Portu Esperanteverdan kravaton, speciale dum viaj kunvenoj por montri la koloron de Espero. Afrankite unu dolaron. TexArt Products, 1762 Boston Post Road, Milford, Conn.

GASTO EL SVEDUJO

Ne esprimeblan ĝojon kaŭzis al ni la jena letero ricevita sub la dato de septembro 2-a kaj ĉio kio sekvis pro ĝi:

Estimata s-ro Klukowski:

Mi devas esprimi al vi mian grandan surprizon leginte en la loka gazeto anglalingva "La Tempo" (The Times) pri la Esperanta gazeto eldonita en Milwaukee. Mi estas Svedo kaj venis al Milwaukee en Februaro, 1949, kaj laboras dum kelka tempo en fabriko de Nordberg Mfg. Co. Venontan decembron mi devas reveni al Svedujo, ĉar mia familio restas tie . . .

Se eble, mi volas aboni vian gazeton kaj per tio mi intencas montri al la dubaj personoj en mia hejmalando ke nia kara lingvo estas ankaŭ akceptita kaj uzata en Usono. Mi do petas vin sendi al mi informojn.

Via fidela

Johano Broman

2920 S. Mabbet Avenue,
Milwaukee 7, Wis.

Bondio! La adreso montras, ke la skribanto loĝas en nia najbareco, proksime, tre proksime de loĝejo de via redaktoro. Pro tio, ke redaktoro kune kun d-ro Nowak devis tiam vorveturi al Madison, ŝtatkapitolo, li komisiis sian sekretarion tuj respondi al nia Sveda samideano pri tio, dankante lin por la letero. Tamen post nia reveno ni telefonis al s-ano Broman kaj invitis lin al nia hejmo. Li venis vesperon de la septembro 12-a. Ne decas, ke ni pli skribu pri la okazo. Ni nur povas kaj volas diri, ke ni pasigis kune kun nia ŝatata gasto vere plezuregan, gajan kaj feliĉan vesperon. Dum la sekvantaj vesperoj nia kara Sveda gasto vizitis niajn oficejojn, presejon kaj eldonejon. Dimanĉon vespere, la 18-an de septembro, s-ano Broman akompanis nin al la centro de Baha-istoj, kiuj invitis la redaktoron prelegi pri "la mondlingva problemo kaj ĝia solvo per la lingvo internacia."